

Mensuel
Numéro 59
Novembre
2009

La SAGO

La Sat-Amikara GazetO

*Espéranto :
vers une culture sociale sans frontières.*

Zone euro : 3,50 €
Suisse : 5 FS
Autres pays : 4,50 €

Verda tajdo

Inter laŭmodaj temoj, ja furoras tiu de la «verda kreskado», kreskado kuirita en ajnaj saŭcoj kun verda kolorigilo por trompe logi la pagantajn englutantojn kaj por ŝajnigi elsavi la planedon. Ne temas pri tiu ĉi, sed pri alia, same noca, nomata «Verda tajdo», pro simileco kun la «nigraj tajdoj» kiuj same suferigis la Bretonajn marbordojn.



Verda tajdo

Kongresa temo:

Je la jaro 1978, nigra tajdo kaŭzita de petrolŝipo «Amoco Cadiz» poluegas bretonajn strandojn. Analoge, la bretonoj uzas tiun esprimon por nomi fenomenon kiu, de kelkaj tempoj, trafas ilin.

Per eksplicita nomo de «verda tajdo» la publiko malkovras neregeblan verdalga invadegon de la marbordoj.

Kiam kaj kie?

Invadego de kelkaj plaĝoj per tunoj da verdaj algoj aperas en Bretonio komence de la jaroj 1970, sed ekkonsciigo de tiu ekologia fenomeno manifestiĝis nur, fine de la jardeko – la unua studaĵo pri tiu problemo de verdaj algoj publikiĝis je la jaro 1977.

Ĉefe, la duonfermitaj golfetoj, dotitaj de unu aŭ pluraj riveretoj, estas tuŝitaj de neregebla alga multiĝo. Ekzemple: la bretonaj golfetoj de Laniono, San Briego kaj Duarnenez.

Kiuj ili estas?

«marlaktuko», «salato», «algo de poluo», verda algo estas insultata


de tiuj fi-nomoj... Pliscience, ekzistas du specoj, malfacile distingeblaj: *Ulva armoricana* kaj *Ulva rotundata*.

Ulvo estas «kosmopolita oportunisto» algo, kiu facile kreskas je eksponenciala pligrandiĝo, ekde kiam ariĝis necesaj kondiĉoj al ĝia ekspansio: sunado, abundeco de nutraĵoj kaj minimuma movado de akvamaso



en kiu verda algo subsurface disvolviĝas. Ili multobliĝas, principe de aprilo ĝis julio, ĉefe ĉe plaĝoj kaj golfetfundoj.

Kreskanta ulvo kapablas akumuli grandajn stokojn kaj transformas, preskaŭ entute, sorbitajn kaj disponeblajn nutraĵojn. Kvankam





la procento de fosforo en la algo stabilas, tamen malsamas pri nitrogeno, limiga faktoro pri ulva kreskado. Tiu necesa nutraĵo elvenas el teraj aldonajoj kunportitaj de fluanta akvo post filtrado tra la grundoj plenplenaj de sterka nitrogeno.

Post grundado, ulvo putras se ĝi ne estas reprenita de la sekvanta tajdo. Post kelkaj semajnoj ulvo komplete mineraliĝas: ĉiuj organikaj elementoj solviĝas en la akvon aŭ gaze emanis kaj disventiĝas en aeron.

Kial verdaj algoj?

Geologiaj klimataj, hidraŭlikaj kaj homaj faktoroj kunprovokas verdajn tajdojn.

Kunportitaj Nutraĵoj

Ulvo, precipe, nutriĝas de fosforo kaj nitrogeno. La sablaj fundoj el tiuj preferataj golfetoj estas por ĝi ĉiama fosforfonto. Fosforo elvenas el urbaj kaj kampaj elfluajoj (lesivoj ktp....). Sed koncerne amasegan nitrogenon reĵetitan en la riverojn, kiu ĉefe originas el kampoj, responsas la troa grasumado de la grundoj.

La transfluado de tiaj nitrogenaj nutraĵoj al maro dependas de diversaj faktoroj:

- grundaj geologiaj kvalitoj
- kultivaj plantoj
- vintra kaj printempa pluvokvanto
- flukvanto de la riveroj
- kapableco de la grundoj por transformi nitrogenajn kombinaĵojn

Minimuma movado de akvamaso

Senmova akvamaso malebligas la diluon de nitraj saloj je la enfluejo. Tiu senmoveco ŝuldiĝas al duonfermitaj golfetoj kaj manko de gravaj marfluoj.

Vasta kaj malforta deklivo de la strando retenas la algamasojn.

Sunado

Ekas kreskadon de ulvoj la suno, sed ankaŭ ĝi povas difekti, per tro intensa radiado, iliajn klorofilajn pigmentojn kaj provoki ĉeson de ilia kreskado. Sed en Bretonio, ili ne timas la sunfrapojn!

Ondoj kaj fluoj

Ili kondiĉas la grundadon de la algoj sur plaĝoj, sed tiuj faktoroj malfacile estas taksitaj. Do, tio ne helpas por antaŭvidi la grundontan kvanton.

Konsekvencoj

La kvanto da ulvoj jare kolektitaj kaj la kostoj generitaj en bretona regiono konstante evoluas jaron post jaro. En 2002, 70 komunumoj kolektis 57 000 m³ da ulvoj kaj en 2004, ili kolektis 70 000 m³. De 2006, ĉiujare, oni registras novajn rekordojn da grundintaj ulvoj.

Medi-nocajoj videblas kaj flareblas. Turistoj fuĝas koncernitajn strandojn. La putrado de tunoj da ulvoj eligas hidrogenan sulfidon, ne nur naŭza sed ankaŭ noca por la specioj en la medio vivantaj.

Surloka putrado de ulvoj rentras multiĝadon de sekvantaj generacioj. Plie, tia kvanto da putraj algoj favoras bakterian multiĝadon. Tia putrado kaŭzas san-problemojn ligitajn al eligoj de amoniako kaj hidrogena sulfido.

Analizoj pruvas ke eligoj de hidrogrena sulfido atingas limajn koncentrojn difinitaj de la Monda Organizo pri Sano. Per letero de la 1a de oktobro 2007, prefekto invitis la koncernitajn urbestrojn limigi publikan enirejon al strandoj.

Pli kaj pli, la ulva tavolo etendiĝas ĝis 15 metroj sub la surfaco. La ret-fiŝkaptado ne plu eblas. Ĉiuj lokoj ne estas same koncernataj, la ulvo-kreskado dependas de la kvanto da uzita azoto.

Laŭ repaĝo de «Eaux et rivières» traduko de:

Alain, Laurent, Amapola, Guy, Marie-Madeleine, Marie Pierre, Rollande et Franjo.

Enhavo

- 1 Kovrilpaĝo
- & 3 Verda tajdo
- 2 BildDeliraĵo: La kastel-nova grupo, 10
- 4 La novaj ludiloj de la policano.
- 5 Metamorfozo de la salajreco en Francio (unua parto)
- 6 Leginda legendo: La murdo de Oziriso

Supplément en français

- 7 Concours : un logo pour SAT-Amikaro
120.000 articles sur la Wikipédia en espéranto
- 8- ...ça bouge partout
- 10 - «Surplacen venu vi»
- 11 Utilaj informoj
- Kiel traduki: Tête (plu)
- 12 Libro-Servo
- 13 Libro vivas pli ol unu sezono: Plena poemaro
- 14 Flore kuiru ! Kukurbeta
- 15 kaĉo
- Esperantistoj aktivas SATam emblemo
- 15- Plu pri «Cotes d'Armor»
- 16

Referendumilo

Ne forgesu
zorge plenigi la
referendumilon 2009
kaj resendi ĝin
samtempe kun via
abon-kotizo 2010
antaŭ la 31a de
decembro 2009.
Dankon!

Partoprenis en ĉi numero: (laŭ alfabeto ordo)

Andreo	Andrio	Franjo	Leveque
	Co	Flora	Markov
MoHo	Do	Vinko	Markovo
Gaby		Vito	Markovo
Louis	Gohin	Guy	Martin
	Fil	Jean	Selle
Maksimiliano	Gverino	Serĝo	Sir'
Ĵak	Le Puil	Juliette	Ternant

La novaj ludiloj de la policano.

El la «Liberecana Gazeto» (*Le Monde Libertaire*) de la 10an de julio ĝis 3an de septembro 2008, ni povas ekaŭdi ke la polica ŝtato ne malfruas koncerne la subpreman teknologion. La klubo kaj aliaj larmigajn ilojn, iom post iom fariĝos kiel memoraroj de la malnova periodo. Eble, ankoraŭ ili uziĝos por ne elspezi la monon de la plej amata Ŝtato. De nun, la Ŝtato uzos ion kio posedos potencon kaj flugradiuson ĝis 10 metroj, ĵetantan du lancetojn de 50000 voltoj. Tiu «mirinda juvelo» nomiĝas «Tazer-16» kiu estas pistolo per elektra impulso, tuj povanta kaŭzi la tetanon de la celata individuo.

La rezultoj estas la jenaj: perfortaj rigidajoj de la muskoloj, fortegaj suferoj... kaj ankaŭ pli danĝera por la individuo suferanta pro tre grava kora streĉo, ĉar tiu sistemo povas kaŭzi la morton. La malŝargo konsistas el 100 ĝis 500 miliamperoj, kaj oni scias, laŭ medicinaj statistikoj, ke 100 miliamperoj, jam altigas la koran frekvencon al kompleta pinto.

Tiel, ni ekaŭdos ke ekde 2002 ĝis 2006, en Usono, la «Tazer-16» kaŭzis la morton de 152 ĝis 200 personoj. Plejcerte, familioj nombris 310 mortintojn. Ni memoru ke dum la Alĝeria milito, generatoro (en franca/slanga lingvo: «la gégéne») estis la plej grava torturo, ĉar ĝi estis enhavanta elektron. Nun, en Irako, la usonaj soldatoj uzas la «Tazer-16» por la torturo, aldone, aviadiloj uzas la «blankan napalmon» povantan ekstermi la loĝantojn de unu vilaĝo.

En Francio, ĝis nun, 2626 ĝendarmoj kaj 1100 policistoj estas ekipitaj per ili.

Kiam Sarkozy estis ministro pri internaj aferoj, li rifuzis la ĝeneraligon de la «Tazer-16», sed poste, M. Aliot-Marie volis ekipi 17000 municipajn policistojn. Tiam, ni imagu la sekvantajn misfarojn... kaj nun, oni scias ke la municipaj policistoj devos plibonigi siajn taŭgecojn pri la uzo de tiuj iloj.

Necesas citi la ekziston de la premgrupoj tre gravaj kiel la premgrupo de la kontraŭ personaj aŭ veturilaj minoj. Nun, pli kaj pli ekzistas minacoj kontraŭ ĉiuj vivoj.

En la artikolo, de la «Liberecana

Gazeto», ni scios ke dum balota kampanjo, Olivier Besancenot deklaris ke la «Tazer» kaŭzis 150 forpasojn en Usono.

Fine, oni kalkulas la nombron de mortintoj kun du «nul».

Li estis akuzita pro kalumnio. Ekde tiam O. Besancenot kaj liaj familianoj estis viktimoj de spionado. Ni memoru la telefonajn subaŭskultojn... kaj eble la kontrolojn en la poŝtoficejoj.

La gazeto precizigis la malfacilojn por la ĵurnalistoj akiri informojn pri «Tazer-16».

Amiko de Rudolf Ĝiuliani, eksurbestro de Nov-Jorko estas administranto de la admistradokonsilantaro de «Internacia Tazer», same kiel aliaj tre gravaj eminentuloj en la politika kaj ekonomia sferoj.

Laŭ Vikipedio, pri tiuj novaj ludiloj, necesas aparte aludi alian ludilon pri kiu la mediatroj parolis al ni, dum la pasintaj semajnoj, kaj povanta konkurenci kun la «Tazer-16» koncerne la eblecon pri danĝeraj vundoj. Temas pri pilkopafo kiu estas subletalo, kaj uzata de la polico, kiu nomiĝas «Flash-ball» per specialaj municioj de diametro 44 mm (kalibro 44/ 83). Temas pri kaŭĉukaj sferoj, kiuj similas al la ĉasoplumbroj, kies forteco ĉe la eliro el la tubo ekvivalentas tiun de la armilo.

En Francio, pluraj personoj estis grave vunditaj, pro uzoj de la «flash-ball»: ekzemple perdoj de okulo; sed pro la premo de la gasoj sur la trafpunkto pliiĝas la danĝereco de tiu armilo, precipekiam ĝi atingas ekzemple la tempion aŭ la trakeon. Inter multaj vunditoj, ne forgesu ke, en Julio, en Montreuil, manifestacianto kontraŭ la elpelo



de kultura centro perdis okulon.

Pro pasintaj okazaĵoj, la ministro pri internaj aferoj malpermesis la uzon de la «Flash-ball» koncerne la municipajn policistojn, sed fakte, tio signifas ke, ankoraŭ, la ĝendarmoj, kaj «CRS» konservos la liberan uzon de tiuj armiloj.

Ŝtato kiu uzas tiajn rimedojn ne estas - kiel ĝi firme asertas - demokrata, sed precipe totalisma, kiel antaŭ kelkaj jaroj, la diktaturoj de Pinochet, en Ĉilio, Videla en Argentino, kaj en aliaj landoj kies reĝimoj aprobas ilin.

Ni, liberecanoj, malaprobos kaj ĉiam malaprobos ĉiujn ŝtatojn, kiuj por transvivi uzos perforton.

Louis Gohin.

Omaĝi amikon...

Freŝdate, asocioj «Eo 94» kaj «Bondy Eo» informis SAT-Amikaron, ke ili decidis aĉeti memorplaton por ornami la tombon de nia kamarado Karlo Biljardo (Billard, vd. LaSagon 54 p. 17), kaj demandis ĉu SAT-Amikaro volas kun-financi kaj -subskribi ĝin. La plato proksimume tekstas simple, franclingve: «Al nia amiko, pro lia senlaca agado por Esperanto».

Evidente la komitato jese respondis, bone komprenante la simblan celon de la afero. Ja tamen estis ioma neentuziasmo pro principa malŝato eniri la fiprofitcelan negocon de la funebro-komercistoj. Nu, la kelkcenteŭra kosto ne estas problema por la asocio, kaj etikiala bojkotado de la afero povus aspekti deekstere kiel avareco kaj nekapablo kuraĝi kompromisojn, kaj tute stulte do estus riski veki disputon pro tia bagatelo. Cetere, tiu memorplato fakte konsistigos plian ZEO-n (Zamenhof/ Esperanto-Objekto) por la kolektemuloj...

Ĝenerale pri funebrado (Karlono mi ne persone konis, sed havis jam similajn spertojn kun propraj konatoj), min ĉiam plej naŭzas la fakto, ke kapitalistoj sukcesas tre lerte kaj lukre eksploati la emociiĝon de la postvivantoj kredigante, ke la funebraj elspezoj (kiuj estas hontinde kostegaj) estas necesaj por certigi pli elteneblan travivon

Metamorfozo de la salajreco en Francio

(unua parto)

En libro titolita *Condition de l'homme moderne* (kondiĉaro de la moderna homo) la sociologo *Hannah Arend* jene resumis la ĉefajn stadiojn de la disvolvado de la moderna koncepto pri la laboro «la subita kaj okulfrapanta leviĝo de la laboro, kiu transpasis de la lasta rango, de la plej malestimata situacio al la glora, fariĝante la plej estimata el la homaj okupiĝoj, komenciĝis, kiam Lokko (*John Locke*, angla filozofo, 1632-1704) rigardis la laboron kiel fonton de ĉia proprieto; ĝi daŭris, kiam Adamo Smiso (*Adam Smith*, skota filozofo kaj ekonomikisto, 1723-1790) asertis, ke la laboro estas la fonto de ĉia riĉo; ĝi atingis sian kulminon en la «laborsistemo» de Markso (*Karl Marx*, germana filozofo kaj ekonomikisto, 1818-1883), en kiu la laboro fariĝis la fonto de ĉia produktiveco kaj la manifestado de la humaneco mem de la homo.

Ekde la 12-a jarcento, kiam mona ekonomio disvolviĝis, la servuto, kiun kamparanoj ŝuldis senpage al senjoro, fariĝis ofte deviga pago. Tiu ŝanĝo de la formo de la servuto estis elaciĉeto, por liberiĝi de submetiĝo, sed la koncernaj kamparanoj iĝis «liberaj» organizi sian laboron. Fakte, tiuj kamparanoj devis plejofte meti sin sub la disponon de senjoro aŭ de riĉa ekspluatanto kontraŭ pago, ĉar la produktoj de ilia terpeco ne estis sufiĉaj, por vivteni. Tio verŝajne

estas la origino de la kamparana salajreco.

En la urboj, bezono de disponebla kaj nemetia salajrularo aperis kaj kreskis en la tempodaŭro, sed granda diverseco de la tipoj de salajreco estigis mankon de estimo en esence metia kaj komerca socio: metikompanoj, servistoj, komizoj, administraj helpantoj, aktistoj de prokuroroj, nefakaj laboristoj, hokistoj, ŝarĝoportistoj, akvoportistoj... Krome la metieco estis stampita per trudado de la majstroj al la metikompanoj, kio restis influata de la feŭda kuratoreco. Cetere, la termino «lakeo» (franclingve *valet*) antaŭis al «metikompano» (franclingve *compagnon*), nu lakeo estis la servisto de mastro; ekzemple, metikompano ne rajtis labori ekster la metiejo de la majstro.

Jam en la 18-a jarcento, vera proletaro aperisenindustriajcentroj:manufakturoj, arsenaloj, ŝpinejoj, minejoj, forĝejoj, kiuj anticipis la uzinojn de la 19-a jarcento. Sur tiuj lokoj, la proletaro konsistis el absolutaj senhavuloj, kiuj havis neniun alian vivrimedon, ol la «satanaj fabrikoj» (anglalingve *satanic mills*) tiel nomitaj en Anglio.

En la 14-a volumo de la Enciklopedio (1751-1772) troviĝas malŝata difino de la salajro: «Pago aŭ serva monsumo (franclingve *gage*), kiun oni atribuas al iu

konsidere ĝian lertecon aŭ rekompence por ĝiaj klopodoj aŭ por la faritaj servoj en iu ajn okazo. Temas ĉefe pri la mono, kiun oni donas al la taglaboristoj kaj penuloj (en la tiama franca lingvo *mercenaires*) por ilia laboro».

Okaze de la industria revolucio de la 19-a jarcento, la salajreco tuj fariĝis koncepto pri libereco kaj kontrakto. Eĉ se oni denuncas la neegalecon de la kontraktantoj kaj la fiktivecon de la libereco de laboristo ofte devigata vendi sian laborforton pro neceseco, oni konsentas, ke la labormerkato ĉeestigas du jure sendependajn personojn, kaj ke la sociala rilato, kiun ili starigas pere de la koncerna interkonsento, povas esti rompata de

unu aŭ la alia el la partioj.

En la kom-enko de la industriigo, la kapitalistoj devis fiksi la laboristan moviĝemon kaj efektiviĝi la laboran disciplinon. La laboristoj iris de minejo al minejo, de konstruejo al konstruejo, forlasinte sian dunginton en neantaŭvidebla maniero pro altiro de pli alta salajro aŭ pro mallogo de laborkondiĉoj. La mastra patronado fariĝis rimedo, por malhelpi al la laborista moviĝemo, ĉar la laboristoj, kiuj forlasis kompanion, perdis ĉiujn «socialajn avantaĝojn», sed la mastra kuratoreco manifestiĝis ĉefe en du instrumentoj: la laborista libreto (franclingve *livret ouvrier*) kaj la laboreja regularo (franclingve *règlement d'atelier*). Kreita en la tempo de la Konsuleca regado (1799-1804), la laborista libreto estis abolita nur en la jaro 1890; ĝi estis necesa, por dungigi, havis la rolon de legitimilo por la polico kaj ĝi surhavis la ŝuldojn de la koncerna laboristo al eksa mastro. Proprietuloj de fabrikoj, la mastroj ellaboris regulojn, kies malobservo estigis punon. Ekster la postuloj pri sekureco kaj higieno, la laboristoj devis adopti la konduton de sobra kaj laborema honestulo, kiu klopodas ĉiom kaj ĉie, por plenumi la utilon de la mastroj. Por la «bonkondutuloj» (franclingve *gens de bien*), ekzemple la popularaj kabaredoj estis lokoj de ĉiaj hontindaĵoj kaj danĝeroj; en sia verko titolita *La question ouvrière au XIX-ème siècle* (La laborista demando en la 19-a jarcento) aperinta en la jaro 1871, la aŭtoro *Leroy-Beaulieu* ne uzis perifrason: «Tie oni fariĝas samtempe enviema, monavida, revoluciema kaj skeptika, finfine komunisto». Pere de la laboreja regularo, la mastra kuratoreco superis la koncepton pri laborkontrakto. En sia verko tradukita en la francan lingvon sub la titolo *L'idéologie allemande* (La germana idearo), Markso kaj Engelso (*Friedrich Engels*, 1820-1895) ironie nomis tiun specon de kuratoreca ligiteco «la ravanta mondo de la feŭdecaj rilatoj».

La mastra kuratoreco povis sendube havi influon sur laboristaron konsistantan el freŝdataj alvenintoj, kiuj estis fremdaj al sia nova industria medio, sed estis ankoraŭ penetrigitaj de siaj kamparaj devenaj kutimoj.

Male, kiam iom post iom la laborista klaso organiziĝis kaj atentis la socialistajn kaj komunistajn doktrinojn, kiuj reliefigis ĝian ekonomian gravecon kaj denuncis la ekspluatadon far la mastroj, tiam ĝi opoziciis al la mastraj formoj de administrado, kiuj petis la laboristojn esti feliĉaj en sia mizero kaj esti dankaj al

...sen domaĝi etikon

de la evento. Patoson regi, etoson streĉi, monujon ŝteli.



Papo krias... (vidu p.16)

Do ŝajnas al mi, ke indas strebi kohere kun sia etiko omaĝi al sia amiko. Ekzemple pri Karlo, mi estus multe pli entuziasma se temus klopodi por akiri iun stratplaton je lia nomo, en la urbo kie li plej multe agadis (kaj eĉ el varba vidpunkto, eĉ setemus nur pri strateto en fora urboparto, ĝi verŝajne estus pli ofte legita kaj pli atentokapta ol ŝablona mortoplato en tombejo...).

Nu, por eviti tiujn etikajn problemojn plej saĝe estas ne morti. Do longan vivon al vi ĉiuj!

Vito Markovo

tiuj, kiuj profitas de ilia laboro.

Inter la indulgo de la «bonkonduktuloj» kontraŭ la mizeruloj kaj la lukto de la ekspluatatoj kontraŭ la ekspluatistoj aperis la nocio pri sociala ŝtato malŝate nomita «providenca ŝtato» (franclingve *Etat providence*). Oni povas diri, ke la sociala ŝtato naskiĝis, kiam la eminentuloj ĉesis plene superregi, kaj kiam la popolo estis malsukcesinta solvi la socialan demandon en propra maniero. Fakte, «providenca ŝtato» estas polemika dirmaniero elpensita de mallaŭdantoj al publika interveno, por denunci supozan submeton. Cetere, tiu denuncio fontis same el dekstruloj kaj maldekstruloj. Jam en la jaro 1849, kunlaboranto de la gazeto *L'Atelier* (La laborejo) skribis la jenon: «Pli ol unu ekspluatato atendas, ke la Providenco, sub la formo de registaro, venu savi ilin el la marĉo sen iu ajn strebo de lia flanko». Li admonis la laboristojn, ke «ili metu pli da fido sur siajn proprajn fortojn, kaj ke ili pli kalkulu je si mem kaj malpli je elreviga providenco, kiun oni nomas ŝtato». Fakte, la providenca ŝtato estas faktoro de individuismo.

Okaze de parlamenta debato pri la ellaborado de la antaŭparolo al la Konstitucio de la Dua Respubliko en novembro 1848, la diferenco inter la rajto pri la laboro kaj la rajto sur la laboro estis reliefigata; deputito klare diris la jenon:

«La rajto sur la laboro, tio estas la rajto vivi laborante». La tiama nacia asembleo rifuzis la enskribon de la rajto sur la laboro en la antaŭparolon per 638 voĉoj kontraŭ 86. La implikoj de la rajto sur la laboro estis perfekte montritaj de Markso en sia verko franclingve titolita *La lutte des classes en France* (La klasbatalo en Francio): «Sub la rajto sur la laboro rangas la povo super la kapitalo; sub la povo super la kapitalo troviĝas alproprigo de la produktiloj kaj ilia subordigo al la laborista klaso asociita, tio estas forigo de la salajreco, de la kapitalo kaj de iliaj interrilatoj». Fakte, de post la revolucio de la jaro 1848 kaj la Pariza Komunumo de la jaro 1871, montriĝis, ke vanaj estis la klopodoj, por senpere enigi socialan demokration, kiu garantius la rajton sur la laboro, en politikan demokration fonditan sur la universala voĉdonado.

Konsidere tion, la opinio de la radikala politikisto Leono Burĵuao (*Léon Bourgeois*, 1851-1925) estis, ke socio estu rigardata kiel tuto da servoj, kiujn ĝiaj membroj faras al si reciproke. Devigaj elprenoj, redisdono de havoj kaj servoj do ne atencas la individuan liberecon. Ili estas retropagoj, kiuj jure kaj juste povas esti petataj de individuoj. En la jaro 1902, la koncerna politikisto diris la jenon okaze de la fondo de mutuala societo: «La feliĉo ne estas kaj ne povas esti la celo de

socio, la egaleco de la vivkondiĉoj ankaŭ ne. Estas ja la justo, kiun ni ŝuldas al ĉiuj niaj proksimuloj».

En la komenco de la industriigado, la proletaro estis esenca kolono de la produktado, sed troviĝis kvazaŭ flanke de la socio. Poste, en la laboristaj kondiĉoj la salajroj certigis rajtojn, ebligis la ricevon de eksterlaboraj avantaĝoj koncerne malsanojn, akcidentojn, pensiojn ekzemple, kaj permesis pli larĝan partoprenon en la sociala vivo, sed en subordiga kadro (loĝejoj por laboristoj, popularaj distraĵoj, unuagrada instruado, amaskonsumado). Tiu strukturo de integriĝo al la socio estas nestabila, ĉar la laboristoj estas enfermitaj en plenumado de subulaj taskoj kaj tenitaj for de la decidopovo.

(daŭrigota)
Jean Selle

Noto.

La elementoj de tiu artikolo fontas el la enhavo de la libro titolita *Les métamorphoses de la question sociale*, verkita de la sociologo Robert Castel, eldonita de la firmao Fayard en januaro 1995.

Leginda Legendo

La murdo¹ de Oziriso

Legendo el la egipta mitologio

«Leginda Legendo» invitas vin legi legendojn el kvar kontinentoj akompanatajn de lingvaj klarigoj pri eroj el la prezentitaj tekstoj. Kvankam ĉefe destinita al komencantoj, «Leginda Legendo» povas interesi ĉiujn legantojn!

Oziriso estis la egipta dio de la boneco. Li alportis la scion kaj la civilizacion al la homoj. Ĉiuj amis Ozirison, la plejadoratan dion... krom² lia frato, nomita Seto, ĉar li estis jaluzza. Li ŝatus esti tiel respektita kiel sia frato, sed tio ne estis la plej grava afero. La plej grava deziro de Seto estis nur detrui Ozirison. Do, li trovis ruzon por realigi sian senkoran intencon³.

Iam, Seto organizis feston. Dum tiu festo, li elmontris plej belegan kofron. Ĝi estis el ligno⁴, kaj farboj⁵ dekoraciis ĝin. La

kofro estis homalta⁶. Ĉiuj ŝatis la belegan kofron. Seto, kiu ne estas donacema⁷, decidis donaci la strangan kofron al la viro, kiu povos kuŝi en ĝi. Ĉiuj viroj provis⁸ kuŝi, sed la kofro estis speciala. Ĝi ne estis ortangula⁹, fakte Seto inventis la unuan sarkofagon¹⁰, kaj li fabrikis ĝin por sia malamegita¹¹ frato. Tiel Seto planis, ke neniu sukcesu kuŝi en la sarkofago, krom Oziriso. Sed, Seto ne donis la belegan kofron al sia frato. Li fermis ĝin, kaj Oziriso ene¹². Seto ne volis, ke lia frato havu la

ŝancon¹³ malfermi la kovrilon¹⁴ de la kofro. Do, li kun naŭ helpantoj¹⁵ ŝlosis¹⁶ la sarkofagon kaj, najlis¹⁷ la kovrilon. Poste, la sarkofago estis jetita en la akvon de la riverego Nilo.

Iziso, la edzino de Oziriso, volis trovi sian edzon. Ŝi amis lin kaj ŝi scis, ke ŝi devis entombigi¹⁸ lian kadavron. Ŝi foriris el Egiptio. Finfine Iziso trovis la sarkofagon en Bibluso. La belega kofro dekoraciis la palacon de la reĝo. Do, Iziso revenigis la sarkofagon en Egiption. Ŝi pensis, ke estis la fino, nun ŝia edzo povis esti en paco... sed Seto trovis la sarkofagon antaŭ ol Iziso entombigis la kadavron. La furiozeco de la malbonco-dio estis tiel granda, ke li distranĉis la kadavron de sia frato. Li ĉirkaŭjetis¹⁹ la erojn²⁰ de la kadavro. Sed Iziso ne malkuraĝiĝis. Ŝi ĉirkaŭiris en la dezerto kaj ŝi sukcesis trovi ĉiujn korperojn²¹ de sia edzo.

Co.

1	murdi	assassiner
2	krom	sauf
3	intenco	dessein
4	ligno	bois
5	farbo	peinture
6	homalta	de la taille d'un homme
7	donacema	enclin à offrir, généreux
8	provi	essayer

9	ortangula	rectangulaire
10	sarkofago	sarcophage
11	malamegita	détesté
12	ene	dedans
13	ŝanco	possibilité
14	kovrilo	ce qui sert à couvrir, ici le couvercle
15	helpanto	celui qui est en train d'aider

16	ŝlosi	fermer à clé
17	najli	clouer
18	entombigi	mettre dans une tombe, ensevelir
19	ĉirkaŭjeti	dispenser, jeter partout
20	ero	morceau
21	korperoj	morceaux de corps

Espéranto: vers une culture sociale sans frontières

120 000 articles sur la Wikipédia en espéranto

Le 15 octobre, la version en espéranto de Wikipédia, Wikipedia, a atteint 120 000 articles. Wikipedia occupe maintenant la 21e position en terme de nombre d'articles parmi les différentes langues de Wikipédia.

Chaque jour, environ 160 000 gens visitent Wikipedio

La Wikipédia espérantiste reçoit chaque jour autour de 160 000 visites de personnes (donc sans compter les robots). A ce titre la version en espéranto de Wikipédia occupait en août la 33ème place - un peu après la grecque et la slovène, un peu devant les versions lituanienne et serbe.

Importance de Wikipedio

La version espéranto de Wikipédia a une utilité multiple pour les espérantistes. Premièrement, elle sert de référence - en fait c'est jusqu'à présent la première encyclopédie généraliste existante depuis 122 années d'histoire de l'Espéranto. Deuxièmement, elle soutient en cela aussi le

travail et la discussion sur la terminologie. Troisièmement, Wikipedio montre clairement au monde non-espérantiste que l'Espéranto est continuellement utilisé et évolue chaque jour. La langue Espéranto, il y a 122 ans la plus petite langue du monde, a depuis une place solide parmi les 50 langues les plus importantes. On constate cela aussi, Wikipedio mis à part, au travers de plusieurs autres statistiques et par son utilisation dans des sites multilingues.

Une contribution à Wikipedio chaque mois

Pour soutenir la construction en continue de Wikipedio, j'appelle chaque espérantiste confirmé à contribuer à Wikipedio par au moins un petit ajout chaque mois. Peu importe qu'il s'agisse d'une petite correction ou d'une rédaction d'article, d'une traduction depuis une autre Wikipédia ou de la création d'un nouvel article. Chaque contribution aide à continuer la grande entreprise - qui est probablement la plus importante oeuvre de l'histoire de l'Espéranto. S'il tout le monde s'y met ensemble, nous y arriverons encore mieux!

D'après Lu Wunsch-Rolshoven,
Esperanto-Land

(traduit de l'espéranto par SAT-Amikaro)
Source: Ret-info (<http://www.eventoj.hu>)


Concours: un logo pour SAT-Amikaro

Dans son numero 57, La Sago annonçait l'ouverture d'un concours organisé par le Comité pour donner un logo à SAT-Amikaro, les propositions devant être envoyées à sat-amikaro@wanadoo.fr. Elles seront publiées tous les mois dans La Sago ainsi que sur le site Internet de l'association (www.esperanto-sat.info). Le concours est ouvert à tous, membres de l'association ou non.

Un débat aura lieu dans les colonnes de La Sago concernant les propositions retenues par le Comité. Le choix du logo s'effectuera par vote lors du prochain congrès de l'association (Pâques 2010).

Nous avons déjà reçu une série de cinq propositions d'un auteur A, et une variante de la proposition 5 de A, par un auteur B.

Les propositions sont volontairement anonymes et les explications données par les auteurs ne sont pas publiées, ceci afin de ne pas influencer: rappelons qu'un bon logo doit parler de lui même et ne pas avoir besoin d'explications.



Les versions en couleur sont éditées en page 15.

N'hésitez pas dès à présent à envoyer vos propositions (même si elles ne respectent pas toutes les recommandations énoncées dans l'article introduisant le concours). vos remarques, et/ou vos proposition d'aménagement (comme pour A5B), par courrier au siège, ou par net à l'adresse indiquée plus haut.

A vos plumes et/ou pincesaux!

Le Comité de SAT-Amikaro
avec l'aide de Frédéric Scibor

■ **LeMonde.fr du 01 octobre** publie une dépêche intitulée «L'espéranto fait son entrée à la faculté de Lettres de Mulhouse».

L'Université de Haute-Alsace à Mulhouse propose depuis la rentrée des cours d'espéranto à sa faculté de Lettres, auxquels assistent pour l'instant neuf élèves, a indiqué jeudi à l'AFP Edmond Ludwig, qui enseigne cette langue universelle deux heures par semaine.

«La faculté de Lettres de Mulhouse est très active au niveau des langues puisque on y apprend aussi l'alsacien ou le

yiddish», a expliqué M. Ludwig, également président de l'association Espéranto France-Est.

«Il y a eu des cours d'espéranto à Clermont, à Paris ou Aix, mais je crois qu'ils n'existent plus, donc à ma connaissance nous sommes les seuls en France à proposer des cours d'espéranto», a ajouté M. Ludwig, un ancien professeur d'allemand aujourd'hui à la retraite et reconnu comme l'un des plus grands spécialistes en France de l'espéranto.

Des étudiants en langues ou en histo-

ri participent à ses cours. Ils sont neuf pour l'instant mais il reste encore une quinzaine de places disponibles.

«On va essayer de démontrer que l'apprentissage de cette langue est efficace et qu'on peut communiquer rapidement», a repris Edmond Ludwig. «Moi, au bout de trois mois d'apprentissage, je pouvais tenir une discussion. Cette langue est un miracle et je ne comprends pas pourquoi on n'a pas réussi à la développer».

«Avoir l'espéranto sur son CV, ça fait poser des questions et ça apporte surtout au niveau linguistique : on apprend plus facilement d'autres langues», a-t-il encore estimé.

Selon M. Ludwig, quelques milliers de personnes parlent l'espéranto en France, plusieurs millions dans le monde (surtout dans les pays de l'est), même s'il n'existe pas de chiffres officiels.

L'espéranto est né d'une idée du Polonais Ludwig Zamenhof en 1887 qui vivait à Bialystok, cité polonaise où coexistaient quatre communautés différentes qui ne se parlaient guère : Allemands, Polonais, Russes et juifs. Zamenhof a créé cette langue facile à apprendre à partir d'éléments des langues romanes, germaniques et slaves, avec un soupçon de latin et de grec.

■ **Le Républicain Lorrain du 02 octobre** publie en page «région» un article donnant la même information.

■ **L'association POLYGLOT** (www.polyglotclub.com) organise, entre autres choses, chaque samedi soir de 19 h 30 à minuit un café polyglotte (34 rue de Grenelle, métro St Germain des Prés). Le responsable, Patrick Rousseau, est lui-même sympathisant de l'espéranto: n'hésitez pas à venir autour du drapeau espérantiste prouver à ce public connaisseur que notre langue fonctionne, en discutant dans une ambiance chaleureuse.




À l'occasion de la journée européenne des langues, le samedi 26 septembre, il a décidé de mettre à l'honneur quatre langues: le breton, l'estonien, l'espéranto et le russe. Après avoir distribué à tous les clients du café un calendrier 2010 d'espéranto-jeunes, j'ai eu droit à environ une heure pour présenter, dans la salle du fond, à une vingtaine de personnes, le maximum de choses sur l'espéranto. J'ai introduit les différents avantages de cette langue autour de mon expérience personnelle notamment, j'ai annoncé les possibilités de cours d'espéranto à Paris ou par internet (Michèle Abada-Simon et Vito Markov étaient présents, et nous avions prévu de la documentation pour les gens intéressés), puis j'ai présenté quelques racines espérantistes et quelques règles de grammaire. On ne peut pas tout dire en une heure, mais le public était intéressé et les quelques remarques ou questions pendant ou après l'exposé étaient pertinentes. Il est vraisemblable que cela aura une suite, si nous conservons le contact.

Patrick Rousseau

■ **Sur le site JBourgogne** (toute l'information jeunesse en Bourgogne) on peut lire :

A l'occasion de la Journée Européenne des Langues, le CRIJ Bourgogne vient de mettre à jour sa fiche d'information Actuel Bourgogne «Cours de Langues à Dijon-agglomération».



Les cours proposés peuvent s'adresser à tout public quel que soit l'âge ou le statut.

L'apprentissage d'une langue peut se faire dans le cadre d'une démarche :

- personnelle de loisirs si vous êtes un particulier,
- professionnelle si vous êtes salarié, demandeur d'emploi, en formation (plan de formation de l'entreprise, congé individuel de formation - CIF, droit individuel à la formation - DIF).

et parmi les langues proposées, on trouve l'espéranto.

Deux organismes proposent des cours d'espéranto sur Dijon et son Agglomération :

Centre Culturel Espéranto
Maison des Associations
Rue des Corroyeurs
21000 DIJON
Tél. : 03 80 47 13 28
Resp. M. Droyer
e-mail : dijon.esperanto@esperantoland.org
- Tous niveaux, tous public.

Centre social et culturel Léo Lagrange
3, rue des Prairies
21800 QUÉTIGNY
Tél. : 03 80 71 91 14 - Fax : 03 80 71 93 06
e-mail : cscleolagrangequetigny2@wanadoo.fr
- Tous niveaux. Enfants et adultes

■ **Le Monde du 26 septembre 2009** publie p19 une pleine page de publicité pour l'espéranto.



L'EUROPE SUBIT UNE DOMINATION DE LA LANGUE ANGLO-AMERICAINE

Cela nous coûte des milliards! C'est le prix du veto français contre l'espéranto au siècle dernier à la Ligue des Nations que nous payons aujourd'hui!

ESPERANTO LERNEBLAS RAPIDE KAJ FACILE

Cette langue s'apprend dix fois plus vite que l'anglais, elle ne connaît pas d'irrégularités ni de complications.

L'espéranto fonctionne depuis plus d'un siècle et dispose d'une riche littérature.

■ **Le Sud Ouest du 26 septembre** publie un article intitulé «L'universel espéranto attend son heure» sur le stand espéranto qui a été tenu à la médiathèque de Camponac à l'occasion d'une manifestation consacrée aux langues.

PESSAC, ATOUT LANGUES.

La médiathèque accueille une manifestation consacrée aux langues
L'universel espéranto attend son heure



Même la BD s'est mise à l'espéranto (PHOTO W.D.)

Dépassé l'espéranto, alors que le capitaine Haddock le parle couramment ? « Ektoplasmoj ! Parazitoj ! » Et que dire de « Gastono » Lagaf ou de Tinĉjo (Tintin) que l'on peut retrouver en Tibeto. Hélas, notre modeste clavier ne peut restituer les merveilleux accents de cette langue universelle [celui de SAT-Amikaro, si !], dont le mot-clé signifie «celui qui espère».

Hier, elle avait droit à son stand à la médiathèque Jacques-Ellul (Camponac). Atout langues s'y poursuit aujourd'hui, sur d'autres thématiques, notamment l'apprentissage des langues étrangères et des séjours linguistiques, comme en Grande-Bretagne. Face au rouleau compresseur anglo-saxon, l'espéranto a bien besoin des miracles d'Asteriks gladiatoro.

Déjouer la loi du plus fort

Mais il attend son heure et Joël Lajus, président d'Espéranto Gironde ne craint pas les géants aux pieds d'argile : « L'anglais s'est imposé par la force de la puissance économique américaine, comme ce fut le cas du français autrefois. Or, cette domination peut-être remise en cause. » En clair, si les USA perdent leur... « leadership ».

Joël Lajus voit déjà la montée du chinois. Et même chez l'oncle Sam, l'espagnol gagne du terrain. En attendant, l'anglais nous coûte cher, en donnant une longueur d'avance

aux natifs : « Ils n'ont pas besoin d'apprendre une autre langue. Pendant ce temps, ils peuvent faire des progrès ailleurs. Ça leur profite dans le domaine scientifique, où les communications sont en anglais. »

Jean-Sébastien Brilleaud résume cet avantage d'une jolie formule : « L'un cherche ses mots, l'autre ses arguments. » Le polonais Zamenhof a lui-même conçu l'espéranto dans un contexte de domination : celle de l'Europe et... du masculin. « 75 % des racines sont d'origine latine », reconnaît Joël Lajus. « Toutefois, le mécanisme qui consiste à agglutiner préfixes et suffixes sur ces racines est simple. Et quand on connaît les règles, on peut facilement comprendre et s'exprimer. Par exemple, ça fonctionne très bien avec des asiatiques. »

Zamenhof l'a fait, d'autres en avaient rêvé : Montesquieu, Descartes, Comenius... Maurice Genevois a rendu hommage à l'espéranto, « en mesure d'exprimer les nuances les plus subtiles de la pensée et du sentiment et il ne peut pas porter ombrage aux fidèles des langues nationales ». Ce serait la différence avec une langue nationale comme l'anglais qui prend le pas sur les autres et les étouffe... « avant de se tuer elle-même par la standardisation qui la tire vers le bas », prédit Jean-Sébastien Brilleaud.

Créer un groupe à Pessac

À l'image de l'association dynamique présidée par Jean-Claude Bot, à Galgon, il « volas krei esperantogrupon » à Pessac : « Dans un premier temps, je pourrai donner des cours chez moi et si le groupe augmente, demander une salle à la mairie. » Il salue au passage l'initiative municipale d'organiser ce forum « Atout langues », même si le stand d'espéranto ne pourra être présent aujourd'hui. Pour des questions de place à la médiathèque, les exposants ne sont pas les mêmes sur les deux jours. Les amateurs peuvent néanmoins contacter directement Jean-Sébastien Brilleaud (05 56 36 64 86).

Auteur : WILLY DALLAY
w.dallay chez sudouest.com

■ **LADEPECHE.fr** publie le 20 septembre un article intitulé «Les cours d'Espéranto ont repris» annonçant les horaires des cours 2009-2010 à Albi.

Albi.Langues

Les cours d'espéranto, langue universelle, reprennent en septembre. Les cours ont lieu 13, rue Négo-Danos à Albi, le lundi, de 18h à 19h30 pour les débutants, et le jeudi, de 9h45 à 11h15 pour les espérantistes deuxième niveau. L'espéranto c'est aussi une langue sept fois plus rapide à apprendre que les autres .

Contactez Claudine Lentz, Tarn Espéranto, au 05.63.76.81.30.



Lors de la fête de fin d'année.

■ YouTube - 09 septembre 2009 -

L. L. Zamenhof était à Genève en 1905...



Une plaque commémorative a été placée en 1934 à la rue du Vieux Collège 12 en souvenir du passage à Genève du créateur de la langue internationale - ESPERANTO. Le 28 août 2009 cette plaque a été remise en valeur lors d'une cérémonie à laquelle participait le maire de Genève et le professeur François Grin (de gauche à droite, ci dessous).



Surplacen venu vi (Traditionnel)

Album ref: VKKD099-033

CD 15 titres - 52:50 mn + 10 mp3 de versions instrumentales pour karaoké + Video MPEG

Surplacen venu vi - KajTielPlu – Barcelone - Catalogne Ibérique

Produit par Vinilkosmo/KajTielPlu © 2009

ALBUM COMPLET 10€

L'album complet est aussi disponible au format ogg Vorbis en téléchargeant en début de liste des titres ci-dessous le dossier ZIP OGG.

Après «Sojle de la klara temp'» vkkd 32 (2001) et «Plaças al mi» vkkd 74 (2004), le groupe catalan KajTielPlu continue à proposer de voyager à travers des musiques du Moyen Age et des traditions catalanes, occitanes et séfarades.

De plus, ici, réapparaît l'esprit original du groupe qui, à ses débuts puisait dans le répertoire international, car il propose aussi des chansons et danses de Croatie, Kabylie, Danemark et Angleterre.

Le premier disque a été plus influencé par la musique du Moyen Age, le second est plus traditionnel.

«Surplacen venu vi» est davantage orienté vers la musique pour la danse (balfolk) et montre la maturité du groupe. Il présente en effet des chansons et danses jouées par un riche et diversifié panel d'instruments comme guitare, mandoline, contrebasse, violon, flûtes, viole de gambe, accordéon, diverses percussions, chœurs et voix principale.

Les chansons, traduites en espéranto, ne trahissent pas les langues d'origine.

Le livret du CD présente les textes chantés en espéranto et les textes dans la langue originale (occitan, catalan, juif espagnol, croate, amazigie et espagnol). Non seulement les traductions en espéranto sont fidèles, mais de plus, elles sont utiles pour faire connaître les différentes traditions et atteignent les cœurs d'un public très diversifié.

Tout comme les deux précédents albums, le disque commence par une mélodie moyenâgeuse et finit par un chant traditionnel de la guerre civile espagnole.

Le CD inclut aussi les 10 versions instrumentales des chansons pour karaoké et une vidéo du groupe en studio.



KajTielPlu c'est :

Anna María Sánchez: Darbouka, tambourin et autres percussions

Carles Vela : Flûte, voix

Elena Milla : Darbouka, tambourin, autres percussions et voix

Ferriol Masip (Farri) : Violon, Voix

Isaac Barrera (Fosi) : Contrebasse

Josep Maria Milla (Jomo) : Mandoline, voix

Xavier Rodon (Xevi): Guitare et voix principale

Musiciens invités :

Ángel Ribas : Accordéon, tom basse

Lucía Rolet : viole de gambe

Enregistrements au printemps et été 2009

Studio (Enregistrements et mix) : Vinilkosmo - Studio de La Trappe (Donneville / Occitania)

Ingénieur du son : Triboulet

Mastering : Alexis Bardinet - Globe Audio (Bordeaux)

Graphisme livret et couverture : Farri - KajTielPlu

Photo de couverture : Sjoerd Bosga

Voir la critique (Recenzo) en espéranto page 12.

Renseignements utiles

Permanence au siège

Lundi	18h30 - 19h30
Mardi	10h00 - 16h00
Mercredi	14h30 - 18h00
Jeudi	15h30 - 18h30
Vendredi	09h30 - 19h30
Samedi	11h00 - 18h00

Cours oraux au siège – pour débutants:

Les lundis 17H30 avec Georges Meilhac

Les mercredis 14H30 avec Hélène Bonjour.

Les samedis 14H00 avec Vincent Charlot

Cours par correspondance d'espéranto : inscription directe auprès de :

C. Gerlat 11 bd M-al Leclerc 38000 Grenoble 0476 01 91 71 claude.gerlat@orange.fr

Retrouvez toute la liste des cours d'espéranto sur le site de SAT-Amikaro, rubrique «Cours d'espéranto»: <http://esperanto-sat.info/rubrique97.html>

Cette rubrique tente de référencer un maximum de cours d'espéranto se déroulant en francophonie. Pour toute mise à jour ou cours manquant, nous contacter.

Service Librairie par correspondance pour les adhérents (catalogue sur demande)

Au siège; Net: <libroservo@sat-amikaro.org>

Contributions pour ce supplément à envoyer :

- de préférence par internet, à lasago@aliceadsl.fr, en format RTF ou TXT pour un document joint, ou directement dans le corps même du message, et en format TIFF, JPEG ou GIF pour les images.

- éventuellement sur papier par poste, les textes devant impérativement être typographiés (machine ou imprimante) sans ratures ni surcharges pour un traitement au scanner (les erreurs éventuelles sont à indiquer dans la marge) à envoyer à: **Serge SIRE, La SAGO 85 impasse des Fées 74330 Sillingy**

Renseignements sur l'espéranto:

FRANCE : SAT-amikaro 132/134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris

SUISSE : Mireille Grosjean, Grand-rue 9, CH-2416 Les Brenets.

LA SAGO. CPPAP n° 0307 G 86224.

ISSN: 1763-1319.

Directeur de la Publication : Guy Cavalier.

Impr. TROISA, 91480 Quincy-sous-Senart.

Dépot légal à parution.

LA SAGO - Octobre 2009.

Espéranto

vers une culture sociale sans frontières

Utilaj informoj

Sidejo:	Lunde	18h30 - 19h30
deĵor-	Marde	10h00 - 16h00
horoj	Merkrede	14h30 - 18h00
	ĵaŭde	15h30 - 18h30
	Vendrede	09h30 - 19h30
	Sabate	11h00 - 18h00

■ Kursoj.

Por la unua grado, vidu lastan paĝon de la franclingva suplemento.

Ĉe la sidejo:

Parolaj perfektigaj kursoj dua grado : ĉiun merkredon, je la 16a, kun Phil Guichet, ĉiun ĵaŭdon, je la 15a, kun Élisabeth Barbay, kaj ĉiun vendredon je la 17a kaj duono, kun Vito Markovo.

Trigrado: ĉiun sabaton, je la 16a kun Vincent Charlot.

La Babilrondo de SAT-Amikaro okazas ĉiun duan merkredon de la monato, je la 17a kaj duono, kun Thérèse Pinet.

■ **Perkorespondaj kursoj, dua kaj tria grado:** Claude Gerlat

38 €. (senlaboruloj kaj ĝis25jaraĝaj junuloj : 19 €.) Ĉeko profite al SAT-Amikaro.

Pedagogio: Mireille Grosjean, Serĝo Sir'.

Kotizoj 2008 al SAT-Amikaro, inkluzive de abono al "La SAGO": 35€

Prezo por unu ekzemplero: Francio, Belgio: 3,60 €; Svisio: 3,80 F.S.; aliaj landoj: 4,60 €.

Abono 2008 al la revuo, sen aliĝo al SAT-Amikaro: Francio, Belgio : 32 €; Svisio : 43FS; aliaj landoj : 39 €.

Por pagi:

■ **En Francio:** SAT-Amikaro

CCP: 37 852 90 L La Source.

N° IBAN, (por pagi el fremda lando):

SAT-AMIKARO.

FR32.2004-1010-1237-8529-0L03-314

BIC: PSST FRPPSCE

■ **En Svisio:** Mireille Grosjean :

Poŝta konto n° 23-14908-9.

Kiu faras Kion?

Directeur de la publication: Guy Cavalier.

Ĉefredaktanto : Vito Markovo.

Enpaĝiganto: Serĝo Sir'.

Korektskipo : Andreo Andrio, Ĵak LePuil,

Vito Markovo, Serĝo Sir'

Helpas al la korektado: Janine et

Yannick Dumoulin, Veronique Girard,

Phil Guichet, Maksimiliano Gverino,

Vinko Markovo

KONTRIBUAĴOJ BONVENAJ! SENDU ILIN:

■ Prefere per reto, al lasago@aliceadsl.fr, tekstoj en RTF aŭ TXT formo por aneksitaj dokumentoj, eventuale en la korpo mem de la mesaĝo, skribitaj per ajna sistemo de ĉapeligo (sed Unikodo preferata), bildoj en TIFF, JPEG aŭ GIF formo.

■ Eventuale sur papero, tekstoj *prefere* tajpitaj, sen forstreko nek surkorekto (erarojn eventualajn, oni indiku marĝene) al La SAGO, ĉe Serĝo Sir'. (ne tajpitaj kontribuaj publikoblas nur se troveblas volontula tajpanto)

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Represo de artikoloj permesata kun indiko de la fonto

Adresaro

La SAGO-abonoj: ĉe la sidejo,

La SAGO-redaktado: ĉe Serge Sire.

Sidejo de SAT-Amikaro: 132/134 boulevard

Vincent-Auriol 75013 Paris

Tel. : 01 44 24 50 48 kaj 01 44 24 50 02

TTT-ejo : <http://www.esperanto-sat.info>

Retpoŝt-adreso: sat-amikaro@wanadoo.fr

Claude Gerlat 11 bd Maréchal Leclerc

38000 Grenoble tel. 04 76 01 91 71

Retpoŝt-adreso : claud.gerlat@orange.fr

Mireille Grosjean :Grand-rue 9, CP 9

CH-2416 Les Brenets

Serge Sire (Serĝo Sir')

85 impasse des Féés 74330 Sillingy

Retpoŝt-adreso : lasago@aliceadsl.fr

SAT: Abono al "Sennaciulo" 2009: 57 €

■ **En Francio:** Pierre Quillaud; 16 rue du Lt-

Vaisseau-Paris 76120 Le Gd-Quevilly

p.k. SAT-Peranto 17 333 10 N Paris.

■ **En Belgio:** Jakvo Schram; Hof Ter

Bekestraat 49 BE-2018 Antwerpen

p.k. 000.1692025.54 (Schram - SAT).

Kiel traduki

Tête (daŭrigo)

◆ En tria grupo la vorto reprezentas la tutan individuon:

Une faute qui retombe sur la tête de quelqu'un. **Kulpo falanta sur ies kapon.**

Une réunion de têtes couronnées. **Kunveno de kronitaj kapoj.**

C'est une tête brulée. **Li estas brulkapulo.**

Une forte tête. **Ŝtonkapulo.**

Une mauvaise tête. **Spitkapulo.**

Le repas coûte 20 euros par tête. **La manĝo kostas po 20 eŭroj por kapo.**

Sa tête est mise à prix. **Li estas serĉata kontraŭ rekompenco.**

Il possède 100 têtes de bétail. **Li posedas brutaron je 100 kapoj.**

Avoir ses têtes. **Havi siajn preferatojn.**

Il fait payer à la tête du client. **Li pagigas laŭ sia prefero.**

Il se paye ma tête. **Li mistifikas min; li mokas min.**



◆ En la kvara kaj lasta grupo da signifoj, *tête* montras la plej altan aŭ plej antaŭan parton de objekto aŭ grupo da individuoj:

La tête des arbres. **La kapo de la arboj.**

Une tête de clou. **Kapo de najlo; najlokapo.**

Une tête d'artichaut. **Artiŝokkapo.**

Une tête d'ail est constituée de plusieurs gousses. **Ajlobulbo konsistas el pluraj bulberoj.**



LibroServo

Sat-Amikaro libroservo

132-134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris
 Telefono : 01 44 24 50 48 (Vendrede 9H30-17H;
 Sabate 11H-18H)
 Retadreso: libroservo@sat-amikaro.org
 CCP : Sat-Amikaro LibroServo Paris 261211 57 G



Sendkostoj
 Al ĉiu mendo
 aldonu:
 40 % ĝis 5€
 35 % ĝis 10€
 25 % ĝis 20€
 20 % ekde 20€

Junulkurso 3a eldono kun komentoj franclingvaj	7,00
Kasedo de Junulkurso, internacie uzebla	7,00
Espéranto Éclair (Raymon Gueguen)	4,00
Cours Rationnel d'Espéranto, édition 2006, broché	10,00
Petite grammaire d'espéranto (Claude Gerlat)	6,00
Communication linguistique (Claude Piron)	5,00
Une humanité, une langue (Simone Glodeau)	2,30
La langue internationale (Raymond Gueguen)	8,00

Dictionnaire pratique (Fr-Eo / Eo-Fr) eldono 2000 formato 140 x 200, tole bindita	23,00
Dictionnaire de poche (Fr-Eo / Eo-Fr) reviziita eldono 2005 formato 105 x 150, 130 paĝoj	4,30
Grand Dictionnaire Espéranto-Français (Gaston Waringhien), 3a, reviziita kaj plibonigita eldono, tole bindita.	23,00
Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, eldono 2005 formato 155 x 245, bindita	80,00

Recenzo:

Surplacen venu vi ...

Jen en esperantista muziko, nova juvelo kiun certe atendis multaj. Jam 25jaraĝa, KajTielPlu ludas je profesia nivelo, ne nur muzika. Ĉiun diskon konstruis homogena logiko : la unua inspiriĝis el trobadoraj kanzonoj, la dua el tradiciaj kantoj, kaj nun tiu pli rilatas kun tradicia danmuziko. La dancoj pli serenas ol francoj kutimas : malrapida valso, trankvila skotiŝo, aŭ kvietaj mazurko, kiuj supozigas ne saltan paŝon, sed pli gracion. Kelkaj spertaj dancistoj opinios ke estas tro malrapide. Afero de gusto. Persone mi ŝatas, kiam la muzikistoj ne provas gajni premion de rapideco, sed pensas pri ĉies dancniveloj, samtempe privilegiantes la muziknivelon. KajTielPlu elektas kantojn laŭ larĝaj geografiaj spacoj, trans montoj kaj maro, eble pli laŭ kulturaj kuzecoj kaj korespondoj. Temas pri tekstoj tradukitaj el diversaj lingvoj kiuj iam kunekestis en Katalunio, la hebrea, la judhispana, la kataluna, la okcitana, la hispana. Aldoniĝas ĉifoje la amaziga, najbara el Kabilio trans Mediteraneo, kaj la serbokroata. Amkantoj, amuzaj foje, zorge tradukitaj, bele elparolitaj. Kiel ĉiufoje, la unua peco estas de trobadoro, kaj la lastan kanton oni dediĉis al la batalintoj de la hispana civilmilito, por ne forgesi. Refoje la registrado estas perfekta, la muzikistoj spertaj, ne nur kompetentaj sed inspirdonaj. Eblas rekoni ne malpli ol deko da instrumentoj bele ekvilibrigitaj, sen kalkuli la voĉojn kiuj interese kompletigas unu la aliajn, kun stabileco de bone mastrumitaj manperkutiloj. Kaj krome la tuto donas senton de profunda kaj delonga trejnado, kies frukton aperas kiel profesia laboro. Krome vi trovos instrumentajn mp3-versiojn por kanti mem, intervjuan filmon kiu bele montras en kiu amika etoso la tuta grupo ellaboras siajn muzikojn. Libreto dulingva en Esperanto kaj kataluna, kun originala kaj tradukita teksto de ĉiu kanto.

MoHoDo

Teknikajn detalojn vidu paĝon 10

La tête de lecture d'un magnétoscope. **La legokapo de magnetoskopo.**
 La tête chercheuse d'une fusée. **La serĉa kapo de raketo.**
 La tête d'un train. **La kapo de trajno.**
 Il marchait en tête du cortège. **Li marŝis ĉe la kapo de la irantaro.**
 Ici est la tête de ligne du métro. **Ĉi tie estas la finstacio de la metroo.**
 La tête de liste est N. **La listokapulo estas N.**
 Cet acteur est en tête d'affiche. **Tiu aktoro estas ĉe la afiŝkapo.**
 Avant le col il est passé en tête. **Antaŭ la montpasejo li estiĝis ĉe la kapon.**

Le wagon de tête. **La kapvagono.**
 L'article de tête d'un journal. **La ĉefartikolo de gazeto.**
 Placez ce mot en tête de phrase. **Loku tiun vorton ĉe la frazkapon.**
 Il est la tête de l'entreprise. **Li estas la kapo de la entrepreno.**
 Il fut tué à la tête de ses troupes. **Li estis mortigita ĉe la kapo de siaj trupoj.**
 Le coureur prend la tête du peloton. **La kuristo estiĝas ĉe la kapon de la densa grupo.**
 Se trouver à la tête d'une fortune. **Sidi sur riĉaĵo.**

◆ Nun venas kelkaj lokucioj kun kunmetitaj franclingvaj vortoj entenantaj la vorton **tête**:

Sur le verglas, la voiture a fait un **Sur la glatiso la veturilo returniĝis. tête-à-queue.**
 Il fallut coucher les enfants **Necesis kuŝigi la infanojn tête-bêche. kapoĉepiede.**
 Elle essaya de nous ménager un **Ŝi provis aranĝi, ke ni renkontiĝu tête-à-tête. duope.**
 Laissons ces amoureux en **Ni lasu tiuj geamantojn resti tête-à-tête. duope.**
 Elle a nettoyé le plafond avec la **Ŝi purigis la plafonon per la tête-de-loup. plafonbalailo.**
 La couleur **tête-de-nègre. La koloro malhele bruna.**

◆ Tiu artikolo finiĝos per Zamenhofaj proverboj:
 Autant de têtes, autant d'avis. **Kiom da kapoj, tiom da opinioj.**
 Quand on n'a pas de tête, il faut avoir **Pro kapo malsaĝa suferas la kruroj. des jambes.**

Andreo Andrio



Kiom da kapoj, tiom da opinioj:
 tamen foje, iom da unuanimeco...

Libro vivas pli longe ol unu sezono...

Sufiĉas rigardi la multnombrajn tablojn plenplenajn de libroj, dum SAT-Amikara kongreso, por konscii, ke libroj havas longan – foje eĉ tro! – vivon... Sed kiel la klientoj de la libro-servo povas orientiĝi antaŭ tiuj centoj da titoloj? Ja recenzoj aperis siatempe, sed kie legi ilin? Malfacila tasko! Do, por helpi la legantojn, ŝajnas ke utilas regula rubriko kun prezento de libroj eldonitaj jam de pluraj jaroj.

Plena poemaro

(1917-1937), Eŭgeno Miĥalski, Flandra Esperanto-Ligo, 1994, redaktis William Auld, kun enkonduko de Krys Ungar, 176 paĝoj, 15,10 € en la Katalogo 2009 de la Libroservo de SAT-Amikaro.

Mi ĝis nun parolis pri 15 libroj: 7 originalaj romanoj, 3 tradukitaj, 2 pri travivaĵoj (1 originala kaj 1 tradukita), 1 pri la urbo de nia pasintjara kongreso Paŭo, 1 originala novelaro, 1 kantaro, sed neniam mi traktis poemaron. Do, ek al!

Sed kial mi elektis tiun poeton? Unue, ĉar li certe «estas de multaj konsiderata kiel la plej granda poeto el la skolo de la proletaj Esperanto-verkistoj de la komenco de la 20a jarcento.» Due ĉar la 19-paĝa enkonduko de Krys Ungar estas brila eseo pri Miĥalski kaj ties epoko, kaj trie ĉar mi ŝategas tiun poeton kaj eĉ muzikigis du liajn poemojn, i.a. «Mi estas»... kiu iĝis

la titolo de mia unua KD (senpaga, nek petita cetere, reklamo!)

Jen ekstrakto de la enkonduko: Miĥalski, pro siaj eksterlandaj kontaktoj kaj pro sia revolucia fervoro, sendube estis suspektinda al la estroj de la teroro. Ekde 1936, la reprezalioj ne plu celis difinitajn grupojn, ĉie oni persekutis homojn. Stalino, en parolo al la Centra Komitato en marto 1937, deklaris, ke ĉie abundas spionoj. La amaskomunikiloj eĥis la temon, kaj la lokaj organizaĵoj strebis plenumi siajn kvotojn rilate arestojn. Oni taksas, ke ĉirkaŭ miliono da homoj estis mortpafitaj kaj pliaj du milionoj mortis en karceroj en la periodo 1937-1938. Homo kun eksterlandaj amikoj, kiu cetere ne estis ano de la Partio, kaj subtenis la fremdan



organizaĵon SAT nepre devis esti suspektinda. Al lia «kulpo» aldoniĝis la faktoj, ke li estis filo de polo (ĉar la soveta ŝtato malamamis tiun nacion), ke li soldatis en la blanka armeo, ke li kunlaboris kun eksterlanda (pola!) eldonejo. Miĥalski estis arestita la 16an de marto 1937.... Oni kondamnis lin al morto la 14an de oktobro 1937, pro la akuzo, ke li estas «krimulo-troĉkiisto» kaj mortpafis lin la sekvantan tagon.

Ĝuu nun du poemojn, la unua de 1919 kaj la dua de 1930, kiuj montras ke kun la paso de l' jaroj, Miĥalski restis ribelanto!

Jak Le Puil

Papo krias

Papo krias en indigno
kontraŭ popolojn-persekut'
Ofendiĝis lia digno
pro soveta di-kondukt'.

Li incensas al Sinjoro
mesas-preĝas en protest';
Lin kunmesas redaktoroj
en gazeta manifest'.

De Londono al Vieno,
de Novjorko al Pariz'
sonas anatem-malbena
de l' piista organiz'.

Sonas mono, sonas sprono,
sonas en la ingo kling'.
Kaj de l' mono, jen kompono:
Frank', dolaro kaj sterling'.

Papo, popo kaj rabeno –
religia kompani',
Triunua entrepreno,
tripersona simfoni'.

Sed el-post la baldakeno
gvide tiras lerta man'
La serpenton de l' fadeno
el la Bors' al Vatikan'.

Ni estas ribelantoj

Ni estas ribelantoj... En unu mano – glavon,
en dua – flagran torĉon – tra l' mondo iras ni.
Al kapital' pereon ni portas, kaj la savon
ni donas al jungita ĝis nun proletari'.

Ekbrulis nova suno. Radioj de libero
tratanĉas la tavolon densegan de nebul'.
Kaj falas rustiĝintaj pordegoj de karceroj
kaj ŝanceliĝas tronoj de burĝo kaj kronul'.

Ondeg' de nova sento renversas ĉian baron.
Libere spiras brusto de laboranta hom',
kaj vane nigraj fortoj kontraŭas bruan maron,
jam malaperas ili, simile al fantom'.

Ho brulu, nia torĉo! Kaj senhezita hako
falegu sur rampantan vipuron de rezist'.
Ne helpas kapitalon fidela ĝia drako –
– ulcero religia, pastraĉo-metiist'.

Eŭropo jam brulegas. Kaj jam revolucie
ruĝegas la standardoj en okcidento jen
kaj «La Internacio» libere sonas tie –
la proletariaro vekiga el katen'.

Nebulo jam disiĝas. Kaj ruĝon de aŭroro
solene kaj majeste elsendas Orient'.
Suriras nova suno, helsuno de Laboro,
sur pura kaj sennuba, lazura firmament'.

Selle humuraĵo



Ordinara afero.



Flore kuiru !

Kukurbeta

kaĉo

... el kuirejo dum muzika
staĝo en Kvinpetalo.

Por 6 personoj:

- 600 g da kukurbetoj
- 250 g da seka pano
- 70 g da fromaĝo
- oleo kaj akvo
- iomete da butero por la plado

Lasu la sekan panon en akvo dum la kukurbeta kuirado.

Purigu kaj tranĉu en pecetojn la kukurbetojn. Kuiru ilin kun iomete da oleo, kaj aldonu dum la kuirado iomete da akvo.

Kiam la kukurbetoj estas kuiritaj, aldonu la panon. Bone miksu ĉion kune.

Verŝu la tuton en butersmiritan gratenajan pladon, kaj aldonu supre raspitan fromaĝon.

Laŭ-plaĉe kaj -guste, vi ankaŭ povas aldoni, dum la kuirado de la kukurbetoj, lardopecetojn. Tiam vi povas uzi malpli da oleo.



Flora Markov

En Avejronio kaj najbaroj.

En la rubriko «Dans la presse» de La Sago n° 58, vi povis legi, ke la gazeto *La Dépêche* mencias la ĉeeston de Esperanto en librosalono, kiu okazis en Vilanovo-en-Avejronio (*Villeneuve d'Aveyron*) la 16an de Aŭgusto 2009. Kelkaj prave supozis, ke mi respondecis pri tiu ĉeesto.

Mi jam raportis, antaŭ kelkaj jaroj, pri mia partopreno en librosalonoj en la ĉirkauaĵo. Mi plu faras tion, en la okcidenta parto de mia departemento Avejronio (*Aveyron*), kaj en najbaraj departementoj : Lotio (*Lot*), Tarno-Garonio (*Tarn-et-Garonne*), kaj Kantalio (*Cantal*).

En tiu regiono, multaj vilaĝoj kaj urbetoj organizas ĉiujare librosalonojn, kie lokaj verkistoj prezentas siajn romanojn, eseojn, poemojn, librojn por infanoj, pentraĵojn, fotojn, ktp. Tie la verkistoj vendas kaj aŭtografas siajn verkojn.

Post la publikigo de *Dictionnaire Pratique*, en 2000, mi enskribiĝis en loka salono en Vilanovo ; poste, iom post iom, mi estis invitata en la ceteraj, tiel kiel mi ne povas partopreni

en ĉiuj. Nun mi povas prezenti tri verkojn : D.P., la poŝvortaron kaj Kiel traduki. Samtempe mi montras, kaj eventuale vendas, aliajn librojn kaj lernolibrojn. Komprenoble mi ne vendas multon, mi ĉefe klarigas tion, kio estas E-o, kaj disdonas flugfoliojn al scivolemuloj. Mi konstatas, ke proksimume la duono de la vizitantoj jam scias, kio estas nia lingvo, sed multaj el ili estas surprizitaj, ke ĝi ankoraŭ ekzistas. Kelkaj opinias, ke la angla lingvo solvis la problemon de internacia komunikado ; estas facile rimarkigi, ke (ekster la anglalingvaj landoj) nur en urboj, kun kelkaj komercaj kaj turismaj oficistoj, oni povas komuniki per la angla lingvo, inklude en la landoj, kie tiu lingvo estas unu el la oficialaj lingvoj. La plimulto de la vizitantoj bedaŭras, ke oni ne instruas E-on en la lernejoj ; kelkaj aĉetas E-an libron por sia kolekto de kuriozaĵoj, precipe bildstriojn ; aliaj aĉetas vortaron aŭ lernolibron, intencante lerni la lingvon, eventuale helpe de Interreto ; tre malmultaj enskribiĝas por la kurso, kiun mi faras en Vilanovo, kelkaj bedaŭrante, ke ili ne disponas sufiĉe da tempo.

Ĉiujare mi kutime partoprenas en deko da librosalonoj. Dum la jaro 2009 mi pasigis naŭ tagojn

Selle humuraĵo



Streso dum laborado

Estimata kunlaboranto de nia entrepreno, elektu alian lokon, por ĉesigi vian vivon.

Mi ne maltrafu tiun lastan okazon adaptiĝi al la entrepreno !

Tio povas sevalorigi la markon !



Plu pri la onta kongreso...

Departemento

« Côtes d'Armor »

Armor : la maro, bretonlingve

La « Côtes d'Armor » estas unu el la kvin bretonaj departementoj situanta inter Finistero (fino de la tero) kaj « Ille et Vilaine » nomoj de la du riveroj de Rennes.

Antaŭe tiu departemento estis nomata « Côtes du Nord » (norda marbordo) ekde 1790, dum la franca revolucio.

Kial tiu nomŝanĝo ? La nomo « côtes du Nord » ne taŭgis : estis nordo de Morbihano, nordo de Bretonio, ne nordo de francio. Krome, bretonoj opiniis ke la vorto « nordo », kiu pensigas pri malvarmo, ne estas bona por turismo, grava somere en Bretonio.

La Departementa Konsilio dum preskaŭ tridek jaroj, petegis nomŝanĝon kaj proponis « côtes d'armor ». Nur en 1990 la nova nomo estis adoptita, kvankam ĝi ne tute taŭgas ĉar ĝi estas pleonasmo (la marbordo de la maro) kaj « Armorique » estas la tuta Bretonio (Finisteranoj kontestis). Krome la departemento enhavas urbojn kaj vilaĝojn de « Argoat' (interna bretonio – de arbaroj – ar goat signifas : bosko) kiel Loudeac. La ĉefaj urboj de « Côtes d'Armor » ĉiuj mezgrandaj, estas San Briego, *Guingamp*, Laniono, *Dinano*, *Loudeac*, *Lamballe*, *Paimpol*, *Tréguier*. La « Côtes d'Armor » estas pli agrokultura ol industria. Dank' al

Esperantistoj aktivas...



en librosalonoj, inkludante la Feston de Eŭropo en Vilafranko-de-Ruergo (*Villefranche-de-Rouergue*), kie mi babilis pri E-o kun deputitino ĉe la parlamento de Eŭropa Unio.

Krom tio, kaj la rubrikoj «Kiel traduki» kaj «Kiel E-igi» en La Sago, mi ĉiusemajne faras radioelsendon en loka radio, en Vilafranko. Tiu duonhora elsendo estas disaŭdigata


dufoje, marde vespere, kaj dimanĉe posttagmeze. Okaze, mi organizas, kadre de iu loka kultura asocio, prelegon de eksterlanda vizitanto, kiun mi interpretas, ĝis nun el Nepalo, Pollando, Argentino kaj Ukrainio. Post tio restas iomete da tempo por korekti La Sagon, kaj prizorgi miajn legomojn kaj miajn fruktarbojn!

Andreo Andrio

konkurso

Nova emblemo por SATamikaro

Jen la unuaj kontribuoj. Vidu paĝon 8.



SAT-Amikaro en la Bellevilloise

Kadre de la «Journées du Patrimoine» kaj de la 150-a naskiĝjaro de Zamenhof, la prezidanto de la Asocio pri Historio kaj Arkeologio de la Dudeka distrikto (Association d'Histoire et d'Archéologie du Vingtième arrondissement - AHAV), Thierry Halay, invitas SAT-Amikaron en la Bellevilloise, eksa laborista kooperativo. Budo estis tenita de la 11-a ĝis la 19-a kaj, poste, okazis koncerto en Esperanto de Famo kaj sinjoro Tarek, kaj poste Francis Soghomonian kantis plurajn kantojn el Eurovision, tradukitajn en Esperanto.

disvolviĝo de la telekomunikadoj kelkaj urboj kiel Laniono multe kreskis.

Koncerne Esperanton, ĉiu parto de la departemento posedas sian grupeton ; la plej gravaj estas en San Briego kaj en Pluezeko, apud *Paimpol*.

Gaby el St Quay-Perros



Logotipo el « Côtes d'Armor » :
 Blua koloro reprezentas :
 maron
 Blanka koloro rememorigas :
 mevon
 Verda koloro elvokas kamparon
 kaj boskojn (argoa)



Mireille Grosjean, peranto de SAT-Amikaro por Svisio, prelegos pri sia sesmonata restado en Japanio ĉe la sidejo de UFE en Parizo jaŭde la 26an de novembro.

La orienta parto de nia departemento «Côtes d'Armor»

La urbo *Dinan* situas je kelkaj kilometroj de la departemento Ille et Vilaine, kie oni povas viziti *Saint Malo*, *Dinard*, *Cancale* kaj iom pli foren la faman Monto Sankta Mikaelo.

La vorto «*Dinan*» devenas de Din An. Din signifis «monteto» en la kelta lingvo, kaj Anna estis honorita kiel la diino de la patrinoj en la kelta religio. Eble pro tio Anna fariĝis poste la ĉefa katolika sanktulino de Bretonio.

Konstruita sur altaĵo, je 75 metroj super la marnivelo, elstaranta super la rivero *Rance*, ĝi celis kontraŭi iun ajn malamikon. Tamen, ĝi estis ofte kaptita. Sur la tapiŝo de Bayeux, ni povas vidi la dukon de Bretonio doni la ŝlosilon de la urbo al la duko de Normandio. Ek de la 13a jarcento, *Dinan* fariĝis unu el la ĉefaj urboj de la Dukoj de Bretonio. La fortikaĵoj kaj la ĉefturo atestas pri tiu grava rolo.

Se vi vizitos nian urbon, vi povos admiri pli ol 100 trabfakajn domojn kaj piediri laŭ vojoj de *Bertrand du Guesclin*, *Jean de Montfort*, *Anne de Bretagne* kaj aliaj famaj personoj...

Quévert estas urbeto apud *Dinan*. En *Quévert* okazas la festo de la pomo kaj la festo de parfumoj ĉiujare.

Dum la festo de parfumoj, ĉiuj knabinoj, kiuj naskiĝis en la jaro, ricevas novajn rozarbetojn kreitajn speciale por ili.

En la rozĝardeno estas genealoga arbo de la rozo nomita «*Reine Marie-Antoinette*»

La devizo de *Quévert* estas: «Anstataŭ plendi pri dornohavaj rozoj, ĝoju pri rozohavaj dornoj»

La Bretona erikejo estas fama en la legendoj de nia lando. Kiam noktiĝas, alvenas tien la koboldoj, kiuj dancadas dum la tuta nokto, inter la uleksoj, la genistoj kaj la erikoj. La radioj de la luno lumigas la pejzaĝon, kaj oni povas aŭdi strangajn muzikon kaj kantojn.

Feliĉe aŭ bedaŭrinde vi renkontos ilin,



dependas de ilia humoro.....

Tiu erikejo plaĉas al mi nur en la legendoj. Fakte, en nia acida grundo, ĝi ĉie superabundas. Sufiĉas unu semo de genisto, kaj...ek! ĝi elkreskas tre rapide por la plezuro de la ĝardenisto....

Do, se vi volas kultivi legomojn, necesas aldoni kalkoŝtonojn al la grundo. Tamen kelkaj ne ĝemas pri tiu fakto.... Venu gustumi niajn mirtelojn kaj admiri niajn rododendrojn kaj acerojn. Des pli ke ofte pluvas, ankoraŭ estas pli bone....

La Ranco

Tiu rivero naskiĝas apud *Collinée*, kaj enfluas en la Manikon.

Ĝi estas cent du kilometrojn longa. Oni konsideras ĝin kiel rivereton ĝis *Evrans*. Ĝia akvo estas dolĉa. Poste, ĝi estas kanaligita pli larĝa sed malplirapida. Saleta iĝas akvo post la kluzo de *Châtelier*. Ekde tiu loko, pli grandiĝas la rivero. En la enfluejo, la fama baraĵo konstruita inter *Saint Malo* kaj *Dinard* decidis pri la alveno kaj la potenco de la martajdo en la riveron.

Sur la dekstra bordo, *Saint Malo* estas fortika urbo parte ĉirkaŭita de la maro

Ĝi estas kunligita al la tero per ĝia haveno. Ĝi estas la urbo la plej vizitata en Bretonio.

Sur la maldekstra bordo, *Dinard* estas fama banurbo. Riĉaj britoj, ĉirkaŭ 1880, elektis tiun lokon kaj poste Eŭropaj burĝaroj. Sed post 1930 ili pli ŝatis la sudon de Francujo.

La du urboj estas kunligitaj per la baraĵo konstruita en 1967 por produkti tajdenerĝion.

«La smeralda marbordo»,

La «smeralda marbordo» nomiĝas tiel pro la koloro verda de la maro. Ĝi etendiĝas de la kabo *Fréhel* ĝis *Cancale*. Oni povas vidi multe da belaj pejzaĝoj kiel la lumturon de la kabo *Fréhel*, la kastelon *Fort la Latte*, la erikejon, kie kreskas la oraj uleksoj kaj la erikoj. Oni vidas ankaŭ multajn belajn havenetojn kaj banurbojn. La tajdoj estas la plej grandaj en Eŭropo. La mitulbredado kaj la ostrobredado estas tre famaj de *Saint Cast* ĝis la Monto Sankta Mikaelo.

la grupo de *Dinan*

La bretona OKK...



kunsidas...



vizitas la kongresejon.